

Ĉu Esperanto estas nur multe da spirito, sed neniom da profito?

---

Al tiu iomete pesimisma medito inspiris min inĝeniero Vlastimil Kočvara, kiu recenzante la libron "Tvorba slov v esperantu" (Vortfarado) en Esperanto/ de docento inĝeniero Jan Werner konstatas, ke tiu teoria libro restos valora ankaŭ en fora tempo, kiam esperantista movado povus ŝrumpiĝi al unu noto en enciklopedio.

Laŭ mia opinio en la enciklopedio de evoluo de nomaro oni aprezos Esperanton, kiel vivantan modernan lingvon kun unika historio kaj dinamika kulturo, kiun agnoskis kaj aprezis Unesko en sia Rezolucio en Montevideo en la jaro 1954. En ĝi estas aprezataj atingoj de E-o sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo.

Paco en justeco - tiu ideo estus la bazo por aktivecoj de esperantistoj. Do, engaĝiĝo por Esperanto estas same nobla afero kiel en engaĝiĝo por la homaj rajtoj.

Ni eĉ ne povas imagi kiom la enkonduko de neŭtrula, relative facile lernebla lingvo kiel dua lingvo por ĉiu povus utili al la nomaro. Estiĝos pli densa reto de personaj amikecoj translimaj, transreligiaj kaj tio utilos al sekurigo de la paco, al forigo de nacia egoismoj, al internacia solidareco kaj reciproka kultura kaj ekonomia pliriĉigo - favore al la bonfarto de la homoj en ĝis nun malriĉaj landoj. Esperanto estiĝos la ebleco helpi al ĉiu kaj amikiĝi kun ĉiu, ĉar malaperos embarasaj situacioj en kiuj homoj ne povas interkompreniĝi.

#### Do kian profiton oferas Esperanto?

Unue, lernado de E-o servas por konservado de la korpa kaj anima sano. E-o ebligas sen lingvaj baroj interŝanĝi pensojn, sentojn kaj kulturajn valorojn. Ĝi kreas kondiĉojn por firmigo de amikeco, fido kaj solidareco inter nacioj. Kontribuas al disvolviĝo de ideoj pri paco, interalie helpe de agado en Mondpaca Esperantista Movado.

Plue, sciante Esperanton oni povus korespondi kun homoj en la tuta mondo. Korespondemulojn ni trovos en dekoj da landoj. La adresoj troviĝas en pluraj Esperantaj gazetoj kaj ankaŭ ni povas aperigi nian anoncon tie.

Tiamaniere ni povas evoluigi nian fakan interesiĝon, ĉar funkcias multaj fakaj organizoj internaciaj, kiuj uzas Esperanton, al kiuj ni povas aliĝi kaj kontakti homojn, kiujn interesas la sama afero, tiel evoluigi nian fakan kunlaboron internaci-skale kaj ankaŭ kontribui al profesiigo de Esperanto.

Ni povas partopreni en esperantistaj aranĝoj naciaj kaj internaciaj. La plej konataj estas kongresoj de UEA - 100-a okazos en Lille /Francio, kaj la 88-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Nitra (Slovakio). La junularo invitas nin al sia 71-a kongreso de TEJO en Wiesbaden (Germanio). Ni povas partopreni en konferenco de fakaj organizaĵoj, kulturaj aranĝoj de esperantistaj centroj, internacia feriadoj kaj tendaroj. Kalendaro de tiuj aranĝoj estas publikigitaj en multaj esperantistaj gazetoj kaj ankaŭ en "STARTO" organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Ni povas aŭskulti radiajn elsendojn en Esperanto por ekscii novaĵojn el pluraj landoj kaj ankaŭ partopreni en konkursoj aranĝitaj en tiuj landoj. Simile kiel faras s-ano Pavel Kašćák.

Ni povas aboni Esperantajn gazetojn, ĉar ili estas riĉa fonto de informoj naciaj kaj internaciaj. Kaj se ni havas intereson kaj talenton, ni povas kontribui - multaj redaktistoj volonte akceptos niajn kontribuojn.

Oni povas verki aŭ traduki libron kaj tiel kontribui al pliriĉigo de la Esperanta aŭ nia nacia literaturo.

Ni povas ankaŭ facile publikigi en esperantista Vikipedio. La celo de Interreto kaj de Esperanto estas la sama - tutmonda komuniĝo; ili estas kvazaŭ kreitaj unu por la alia. Interreto faris revolucion en utiligo de Esperanto. Ĝi disponigas al E-o kaj esperantistoj novajn, fantaste interesajn terenojn. Krome, nun kiu ajn homo povas lerni Esperanton kaj diversmaniere esperantumi, eĉ ne elirante el sia loĝejo, kiel prave diras Boris Kolker.

Ni havas ankaŭ unikan ŝancon legi originalajn verkojn, kiuj ekzistas nur en Esperanta literaturo.

Tre oportune estas turismi per Esperanto. Vojaĝante per esperantista entrepreno ni ne nur vizitas ĉion ĉi sed ankaŭ amikiĝas kun homoj, vizitante anojn de la loka movado. Nemultekostan turismadon ebligas Pasporta Servo de TEJO.

Eblas ankaŭ fondi INTERNACIAN ENTREPRENON komercan, turisman aŭ alian kaj tiamaniere doni ŝancon al sciantoj de E-o trovi pagatan laboron.

Ni povas ankaŭ profesie studi en Akademio Internacia de la Sciencoj en en San Marino (AIS), ĉar unu el la oficialaj lingvoj de la akademio estas Esperanto.

Ni povas ankaŭ instrui Esperanton, ĉar ĉie sur la Tero mankas kompetentaj instruistoj de la lingvo.

Kaj certe Interreto, tiu fascina virtuala mondo de komputilaj libroj, en kiu ĉiam pli multe da esperantistoj komunikas tre rapide, efike kaj senlime oferas al esperantoj senlimajn eblecojn kiel plibonigi la mondon.

Koincide la katolika papo Francesko en Romo, okaze de Pasko, proklamis la jaron 2015 kiel la jaron de mizerikordo.

La plej brila ekzemplo de ligo inter Esperanto kaj mizerikordo estas la vivo de membro de la Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Brno /SILE/ s-ano Adolf Veselý. Kiu kiel elmigrinto el Ĉeĥoslovakio transiris Germanion kaj alvenis en Francion, kie li trovis amikojn esperantistojn - anoj de Sennacieca Asocio Tutmonda /SAT/ kaj ricevis laboron en fandejo en sudfranca urbeto Le Creusot. Bedaŭrinde, tie lin trafis danĝera akcidento, kiam dum fero-fandado liaj piedoj terure brulvundiĝis.

El hospitalo ili ellasis lin hejmen, ankoraŭ ne tute sanan. Sed tiu hejmo estis nur malgranda dometo perdita en montaro, kie li vivis izolita sen ia homa helpo dum kruela vintro. Li ne kapablis stari sur siaj kripligitaj piedoj. Li havis nenion por manĝi, krom kelkaj pecetoj de sukero kaj sian febran soifon li mildigis nur per neĝo. Li kuŝis tie sen fajro kaj sen lumo en agonio, atendante alvenon de anĝelo de morto. Sed feliĉe ne tiel okazis. Tute hazarde trovis lin anoj de Ruĝa Kruco.

Post sia resanigo li foriris en Parizon, kie li ĉiun monon fordonis al mizeruloj, kiuj dormis en kruela malvarmo ĉe bordoj de Sejno. Kaj li mem tranoktadis sur ŝtuparo de metroo. Nokte li migris, kiel multe aliaj, preter parizaj bazaroj, kie li povus trovi de tempo al tempo iun frostitan frukton aŭ peceton de forjetita pano.

Poste trovinte la laboron kiel nokta prizorgisto en hotelo li ofte vizitadis SAT-oficejon por helpi tie kaj babibili kun esperantistaj geamikoj. Tio estis li la plej ĝuinda periodo de lia vivo.

Tiam en la jaro 1956 traŭrante kun pepo la straton Bourdonnais, li hazarde aŭdis pri abato Pierre kaj proksime trovis ankaŭ la Emmaŭs-domo, kie li estis akceptita kiel invitata gasto kaj tie li trovis ankaŭ abaton Pierre, eble en tiu tempo ili ĵus tie filmis "La Ĉifonistoj de Emmaus".

La amika atmosfero en tiu Emmaus centro kaj maniero, kiel abato Pierre konsideris la homojn, ĉiujn individue, ne zorgante pri la media aŭ landa deveno, ĉu li estas kredanto aŭ ateisto, ĉu filandropo aŭ mizerulo. Tiu ekzemplo de abato Pierre ŝanĝis la vivon de Adolf Veselý. Li forferis sian modestan havaĵon al aliaj, kiuj fartis pro sia aĝo aŭ alia plago pli malbone ol li.

Danke al Esperanto, Adolf trovis en Francio belan amikino, kiun li edzinigis en la jaro 1962. De tiu tempo tempon Anička Kerenforn-Veselá helpas al Adolf disvastigi testamenton de Abato Pierre en spirito de la movado de Emmaŭs, tio signifas laŭ siaj ebloj servi al tiuj, kiuj plej suferas.

Konkludante ni memoru, ke jam en la jaro 1993 Internacia Asocio de Verkistoj definitiva agnoskis Esperanton kiel  
LITERATURA LINGVO

Dankon por via atentemo!